# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 28/03/2024 sescentokdeka eldono (unua eldono 26/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

Ne estas facîla elekti el al ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.

**PLI MALALTAJ NASKINDICOJ TUTMONDE** 25 DE MARTO 2024 (*ROGER SPRINGER*)

Legu kaj ĝuu la vivon
La homaro nun mem solvas la problemon de tro multaj homoj sur nia finita planedo.
Ne necesas militoj, mortmalsato, virusoj. Ktp.
Oni devas forgesi ke mono estas pli grava ol la homaro. *Roger Springer*

**3ZZZ** En la elsendo de la 25a de marto 2024 vi trovos novaĵon pri la sorto de la kataluna lingvo, plian konsilon por konservi bonan sanon kaj raporton pri rabado de beboj kaj infanoj en Hispanujo, fenomeno kiu okazis bedaŭrinde en multaj landoj. Vinilkosmo eldonis novan albumon de Tim *Bela vivo* . Vi aŭdos kelkajn el liaj noval kantoj kaj ekscios pri la muzikisto, komponisto Tim *Franciska Toubale*



La tamburoj de la tria mondmilito sonoras

Kiam ajn ni ricevas novaĵraporton, ni faru du demandojn al ni mem

1. Ĉu vere? Kaj 2. Kiu profitas? *Roger Springer*

# KONTROLU ĈU VI SKRIBIS LA ĜUSTAN RETADRESON!

Geedza paro decidis flugi al Perto por eskapi dum kelkaj tagoj la senĉesan pluvon en Sidnejo. Ili celis ripozi en la sama hotelo en kiu ili monatmielis 20 jarojn pli frue. Pro febra farendaĵolisto la edzino restis hejme dum la edzo flugis sola; la plano estis, ke ŝi sekvu lin la postan tagon. Alveninte al la hotelo, la edzo vidis komputilon en sia ĉambro kaj impulseme decidis retpoŝti sian edzinon. Hazarde, li ellasis unu literon el la adreso, kaj, sen konstati la eraron, sendis la mesaĝon.

Dume, ie en Melburno, vidvino ĵus revenis de la funebra ceremonio por sia edzo, pastro kiu suferis koratakon kaj mortis. La kompatindulino sidis por kontroli sian retpoŝton, atendante kondolencajn mesaĝojn de parencoj kaj geamikoj. Post legi la unuan, ŝi kriegis kaj svenis.

Ŝia filo kuregis en la ĉambron, vidis la komputilekranon, kaj legis: *18.02.24. Mia tre amata edzino, jen mi alvenis senprobleme. Sendube vi surpriziĝas ricevi mesaĝon de mi, sed ja troviĝas komputiloj ĉi tie nun, kaj oni permesas sendi retpoŝtojn al geamatoj. Mi ĵus registris min senprobleme. Kaj feliĉe, ĉio estas en ordo por via alveno morgaŭ. Mi fervore antaŭĝuas vian ĉeeston. Espereble ankaŭ via vojaĝo estos tiel seneventoplena kiel la mia. xoxoxo Via amanta edzo. P.S. Estas neimageble varmege ĉi tie!!!*



*Vera Payne* 😁 (Dum Februaro 2024, Perto spertis 7 tagojn je 40C aŭ pli!)

# AEA-estrarkunveno Ĵaŭdo, la 21-a de marto 2024

Ĉeestis: Jonathan Cooper, Heather Heldzingen, Joanne Johns, Sandor Horvath, Bradley McDonald, Caroline Turner, Pedro Danzer

## (1) Somerkursaro 2025

Ni vere ŝatas ke Trevor kaj Katja partoprenu nian venontan kursaron en jan 2025.
Trevor ankaŭ pretas instrui dum la venonta kursaro, sed li ne plu pretas vojaĝi al aliaj lokoj en Aŭstralio.
>>>>> Ni vere ŝatus, ke la kongreso okazu en Adelajdo.
Sandor elsendis peton al ĉiu esperantisto en Sudaŭstralio ke ili helpu trovi taŭgan ejon en Adelajdo. Ni daŭrigas la serĉadon en Adelajdo. HELPU nin!!

## (2) Ejo en Melburno?

Ni daŭrigis la diskuton .....
Ni atendu pli detalan proponon de la Melburnanoj. Ĝi venos post kelkaj tagoj.

## (3)Tri arkivaj labortagoj

Kelkaj labortagoj en Sidnejo? Ni decidis: Ni laboros en Esperanto Domo por ordigi nian arkivon.
Mer 24-a - ven 26-a de aprilo 2024 ..... Kontaktu nin se vi volas helpi.

## Venonta estrarkunveno

Ĵaŭdon, la 4-an de aprilo 2024

*Sandor Horvath*

